

NOVAJ LIBROJ

Lins, Ulrich: *Utila Estas Aliĝo. Tra la unua jarcento de UEA. 126 paĝoj. UEA Rotterdam 2008. Prezo: 15.00 €*

La libro kun la amuza titolo *Utila Estas Aliĝo* (UEA) konsistas el tri kontribuajoj pri la historio de Universala Esperanto-Asocio. La unua kontribuo estas eseo, kiu prezentas retrorigardon al la pasintaj cent jaroj de la asocio. Ĉar tiu historio estas tro longa kaj la spaco en la libro tro malgranda, la aŭtoro elplukis la ĉefajn mejloŝtonojn en la evoluo de UEA ekde la fondo de Hodler, kaj kiu poste estis pinte gvidata de Privat, Lapenna kaj Tonkin, kredeble la plej famaj figuroj en UEA. La aŭreolo, kiun tiuj gvidantoj havis kaj havas, faras ilin iusence netuŝeblaj, nekritikeblaj, mistike duonsanktaj. Kvankam tute ne temas pri propaganda aŭ fanfarona artikolo kiel volonte praktikate en UEA-medioj, la skizo de Lins, en kiu oni povus vidi iusence la komencon de la „kortega historiografio”, nur supraĝe aludas kritikajn punktojn, por bruski neniun. Dezirata kaj bezonata estus nun objekte kritika historiografio; partiaj historiografoj ne tre taŭgas por plenumi tiun postulon. Sendube en la kazo de UEA temas pri nobla kaj unika asocio, kiu provis ĉion kaj meritas multon por la antaŭenpuŝado ne nur de Esperanto mem, sed ankaŭ de la internacia komunikado inter amaso da homoj el preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo trans la lingvaj limoj, politikaj blokoj kaj kulturaj barieroj. Ĉi tiun meriton atestis Unesko ĝis Leszek Kołakowski. Kaj ŝajnas, ke ĝia neŭtraleca eksperimento eĉ grandparte sukcesis, kvankam post 1989 tiu neŭtraleco verŝajne devus esti laŭdifine, kaj laŭpraktike, reviziita, por adapti sin al la nova realo. Dum Tonkin kaj Fettes estas abunde citataj, ne estas adekvate honorita nomo kiel Osmo Buller, apud Sadler kaj Milojević la ĉefa burokrato-teknokrato de la UEA-sistemo, kiu tamen kelkfoje libervole savis la laboron de la Centra Oficejo de la kolapso kaj esence kontribuis, ke UEA daŭre havas funkciantan Centran Oficejon. Oni ankaŭ ne komprenas kial tiom sobra kaj seka aŭtoro kiel Lins povas doni entuziasman atenton al fiaskinta intelekta fikcio kiel la Praga Manifesto kun ĝiaj blufaj asertoj, terminologiaj distordoj, kiu estas laŭdata kiel „konciza, trafa vortumo“, kiu „plene konfirmis al la stilo de argumentado taŭga dum la transiro al nova jarcento“. Samtempe la aŭtoro miras, ke tiu manifesto ne havis mezureblan reeĥon, citante Tonkin, kiu bedaŭras, ke ĝi ne sufiĉe enradikiĝis en la esperantista publika opinio. Cetero en la bjalistoka UK la Manifesto de Prago estis konsiderata kiel malaktuala.

La historia cezuro de 1989 estas komentita per la banala konstato, aŭ konkludo, ke „la falo de komunismo pligrandigis la agterenon de UEA, sed iagrade ankaŭ limigis ĝin. Ne plu taŭgis varbi en orienta Eŭropo por Esperanto kiel ‚fenestro al la mondo’, ĉar tie la ekstera mondo ne plu estis fermita.“ Kaj: „Kiam falis malnovaj baroj, UEA kaj ĝiaj landaj asocioj energie laboris por levi la kvanton kaj kvaliton de siaj servoj por allogi kaj daŭre ligi al si tiujn homojn, kiuj malkovris la *alian* aliron al internacieco.“ Ĉi tiuj frazoj, same kiel la sekvaj, estas almenaŭ diskutindaj. Alia konsekvenco de la falo de la berlina muro estas, ke „en la programon (de la UK. rim. Red.) nun eblas meti erojn, kiujn oni pli frue, timante protestojn de orienteŭropanoj, per memcenzuro ne allasis.“ Pri la maniero vojaĝi kaj pri la rolo de la angla lingvo: „Kreskanta nombro de homoj en ĉiuj partoj de la mondo, el ĉiuj aĝgrupoj, volonte vojaĝas alilanden kaj praktikas komunikadon kun alilandanoj kvazaŭ memkompreneblaĵon. La plej ofte uzata komunikrimedo por tio estas la angla lingvo, kiu estas, eĉ se nur iom, komprenata preskaŭ ĉie kaj kies konon multaj dungantoj jam ne plu klasifas kiel tiun de fremda lingvo.“ Certe

temas pri flato, sed samtempe pri kompleta konfeso de totala fiasko de Esperanto kiel lingvo, kiu ŝatus vidi sin en la rolo de la angla. Pro tio „Mark Fettes admonis la esperantistojn ne kontraŭbatali la uzon de la angla, sed fieri pri la ŝanco de ‚egaleca komunikado‘, kiun donas nur Esperanto, senrivale.“ Tio estas unu el la mitoj, kiujn Lins ne sufiĉe kritike renkontas. Tie Lins vidas ankaŭ kaŭzon, „kial tute malsukcesa estis la granda fortostreĉo, per kiu UEA precipe en la okdekaj jaroj klopodis penetrigi Esperanton en la sciencon.“ Prave diri, ke „la UK restas nesufiĉe videbla por la publiko“. Ĉu la signifo de la revuo *Esperanto* „ne malkreskis“ estas ankaŭ iom dubinda aserto, se oni konsideras la ŝrumpantan membronombron de UEA, kiu ĝuste okazis post 1989, kvankam oni en blinda naiveco antaŭvidis, ke la membronombro duobliĝos, ĉar orienteŭropanoj povus pagi sian kotizon per rubloj, zlotoj, forintoj aŭ levoj. Ŝajnas, ke Lins bedaŭras, ke la pli frua temo-gamo, kiu estis „tre varia“, ŝanĝiĝis favore al temoj, kiuj rilatas al Esperanto kaj ĝia movado. La interreton Lins konsideras kiel inovacion kun „granda signifo“ kaj kiu „komencis ludi elstaran rolon por informi pri Esperanto“ kaj ankaŭ por lerni ĝin. Novuloj aperas en la movado ankaŭ sufiĉe ofte dank’ tra tiu rimedo, kiu anstataŭis la bonan malnovan leteran komunikadon perpoŝtan. Cetere Lins ne kredas, ke la progreso de la interreto baldaŭ igos librojn superflujaj kaj atentigas pri la Libroservo de UEA, kiu jes estas elstara afero, kiun la movado posedas. Laŭ Lins la asocio produktas „ne vere multajn“, „sed kvalite plejparte elstarajn“ librojn. Verŝajne ankaŭ tio estas troigo, ĉar inter tiu libraro estas ankaŭ amaso da fatraso. La elektronika revolucio ja certe draste ŝanĝis la kutimon de la homoj membriĝi kaj pagi kotizon, kiel Lins ĝuste komprenis, sed eble ne nur pro tio. La konkurenco de nacilingvaj servoj kaj ofertoj estas simple tro grandaj kompare kun la modestaj eblecoj kaj primitivaj rimedoj, kiujn Esperanto proponas. Esperanto tiom terure stagnis kaj postrestis kompare kun la gigantaj dimensioj kaj resursoj de intelektaj scioj kaj sciencaj konoj, kiujn la grandaj nacilingvaj kulturoj ofertas – ankaŭ tion necesus foje honeste diri. Kiel Lins atentigas, la edukiteco de la homoj respeguliĝas eĉ en la Esperanto-movado, kiu osciladas inter movado kaj lingvokomunumo. La senrivaleco de la „egaleca komunikado“ en la kazo de Esperanto, pri kiu Fettes tiom insistas, eble validas, sed nur teorie, abstrakte. Temas ne nur pri mito, kiun esperantistoj kreis, sed ankaŭ pri pura ideologio, kiun en tiu formo hodiaŭ ne plu estas kredinda, eĉ ne inter realismaj esperantistoj mem. „Lingva demokratio“ bone, sed neniu scias kio ĝi estas en praktiko lige kun Esperanto, ĉar historie ne elprovata (krom en Esperanto-kongresoj, sed en internaciaj kongresoj oni povas uzi iun ajn lingvon kiel komunan, eĉ la katalunan, kiu eble ne estas pli malfacila ol Esperanto). Plej trafe tiu lingva demokratio estas eble realigita en Svislando, sed sen Esperanto.

Fine de la artikolo kelkaj aliaj mildaj kritikaj konsideroj ankoraŭ aperas en formo de konscio kaj deziro, ke UEA devus *kaj* disvastigi Esperanton *kaj* disvolvi la Esperanto-komunumon, citaĵo el Fettes. La artikolo postlasas la impreson, ke Lins ja komprenis kaj grandparte ĝuste perceptis la gloran pasintecon de la organizo, sed samtempe oni rimarkas, ke al ĝi mankas perspektivoj por la estonto. Tamen, „malgraŭ senreviĝoj, UEA, kiu ne plu devas timi la konkurencon de SAT kaj kiu fariĝis pli malferma al la agado de aliaj organizaĵoj, ne donas la impreson, ke ĝi komencas pridubi la kialon de sia ekzisto.“ Ja utilis la demando, „ĉu necesas redifini kelkajn agad-principojn.“ Oni do utiligu pli forte la doktrinon de la estraro, ke UEA estu komprenata kiel „forumo por tutmonda movada kunlaboro“. Eble eĉ la (kvante kaj verŝajne ankaŭ kvalite neglektebla) Esperanta Civito, kiu havas ne pli da signifo ol ajna averaĝa fakasocio de

UEA, kunludus, kiel montris la eta ridinda flirto dum la ĵurnalisma konferenco en Vilno, en 2008..

La dua kontribuado estas dediĉita la vivo, idearo kaj verko de Hector Hodler. Eble ne tute superfluas emfazi, ke dank' al la konkludoj de la filo de la svisa pentristo Ferdinand Hodler, UEA estis fondita de Hector Hodler kaj ne de Zamenhof, kiu ankaŭ revis pri internacia ligo de esperantistoj, sed ne sukcesis. Hodler pensis pri „Delegitaro“, kiu ludus la rolon de „fortika ligilo de solidareco“, kaj el kiu fariĝu demokrata asocio, simpla, servopreta kaj malmultekosta. Komence lia nova asocio vekis ĉe kelkaj movadaj gvidantoj nur tre moderan entuziasmon, kaj mokon, ĉar oni kredis la novan organizaĵon nevivipova. Ankaŭ Zamenhof mem apartenis al tiuj skeptikuloj. Sed Hodler firme iris sian propran vojon, por fari el sia organizo praktikan mekanismon, kaj tiam ankoraŭ neniu antaŭvidis, ke el la hodlera UEA iam fariĝos la esperantista ĉeforganizo. La mallonga studo de Lins, kiu klarigas la ideologion, kiun Hodler ‚donacis‘ al UEA, baziĝas sur plej diversaj fontoj el Hodler kaj Privat kaj do faras la kontribuadon aŭtentika kaj la temon plustudinda. Hodler liveris ankaŭ la esperantistan pravigon de Ligo de Nacioj, kies fondon la sviso bonvenigis. Sed pro la fiasko de la Privat-a rezolucipropono, kiun kontraŭstaris francoj kaj aliaj, la esperantistoj seniluziigis pri Ligo de Nacioj. Mortinte tro frue, en 1920, Hodler postlasis organizon, kiu volonte akceptis la monan heredaĵon, sed malpli la idearon de la fondinto. De la hodlera internacijura pacifismo, kiu ŝajnis esti temo tro ligita kun la mondmilito, oni pli kaj pli distanciĝis, des pli ke la malsukceso de Ligo de Nacioj estis antaŭvidebla, kaj Privat, karaktere komplete alia tipo ol Hodler, dum sia prezido aplikis pli pragmatan, malpli ideologian, aŭ almenaŭ teoriantan kurson, konforme al la premisoj de la tiama tempo. Dank' al sia sangvina, kontaktema karaktero Privat nelacigeble varbadis por Esperanto ĉie kaj serĉis la kunlaboron kun ĉiuj pozitivaj fortoj, kun la provo disvastigi kaj enradikigi Esperanton ĉie kie eblis aŭ utilis. Poste sekvis la abrupta demisio de Privat, la faŝismo, sovetia bolŝevismo, stalinismo kaj la antisemitismo, la movadaj skismoj (SAT 1921 kaj IEL 1937) kaj ties sekvoj kaj la dua mondmilito – ĉio tre malfavoraj faktoroj por la Esperanto-movado, kiu postmilito estis restarigita de Lapenna kaj ties kunlaborantoj apoge al la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj de 1948 kaj la kunlaboro kun Unesko. Pro la drasta publika domineco de Lapenna, Homaj Rajtoj kaj Unesko, Hodler ŝajnis iĝi pli kaj pli forgesata, nu ĉar lia idelologio poste ne plu estis utiligebla – ĝis kiam en 2008, kiam UEA centjariĝis, li denove akiris certan publikan atenton, ekzemple per ĉefprelego okaze de la Malferma Tago en novembro 2008 en la Centra Oficejo en Roterdamo aŭ per artikoloj en diversaj revuoj.

La plej atentokapta kaj eble plej profunda kontribuo estas la eseo pri Ivo Lapenna kaj la komunistoj, kiu estas dividita en tri aktoj: La unua akto ĉirkaŭas la studentajn jarojn de Lapenna, dum kiuj lia proksimeco kun la jugoslaviaj komunistoj allasis supozojn aŭ dubojn, ĉu li estis membro de la komunista partio aŭ ne. Kiel Nada Gropuzzo raportis, Ivo ja „iĝis membro de komunista partio pro politika naiveco kaj idealismo.“ Kaj post la venko de Tito, la kariero de Lapenna komenciĝis atentinde. Kiam Lapenna estis atakita pri skrupuloj pri la sovetia komunismo, kiu malgraŭ nuancoj regis ankaŭ en Jugoslavio, li komencis timi la komunistan partion, kiel la sama Gropuzzo atestas, kio kondukis lin al la decido elmigri al Okcidento. Kiel montras akto dua, en Okcidento li renkontis novajn homojn, kiuj suspektis lin komunisto, ekzemple Hans Jakob. Kaj kiam en Usono la ‚afero Connor/Solzbacher‘ iom skuis la movadon, Lapenna estis plene trafita de la stigmato pri agenteco de Moskvo. Sed post 1955/56 la pozicio de Lapenna, kiu rapide

kariere ankaŭ en UEA, stabiligis. Tamen la hamburgaj eventoj en 1974 montris ankaŭ klarajn limojn por Lapenna, kiel klarigas akto tria. Denove komunistoj kaj maldekstremaj 1968-generacianoj ludis iun rolon en la (subpreme memelektita) falo de Lapenna, kiu ŝokite vidis etendiĝi UEAn al la komunisma Orienta Eŭropo kaj al landaro, kiujn iuj hodiaŭ parte nomus kanajlaj (ekzemple Kubo, Irano). Sekve li komencis obsede kaj preskaŭ fanatike kondamni ĉiujn pri komunisteco kaj moskva agenteco. Lapenna izoligis en sia propra ‚neŭtrala movado‘ nomata ICNEM, en kiu li pravigis sian pozicion, sed kun malmulte da sukceso. La pli kaj pli mizera sanstato de Lapenna, kiu kondukis al lia morto en 1987, ĉesigis la ‚aventuron Lapenna‘. Birthe Lapenna, lia vidvino, kiu sindone flegas la heredaĵon de la kroato, fanatike vartante pri tio, ke neniu makulu la bildon pri la absoluta perfekteco de la heroo, estas en la eseo de Lins entute ne menciita. Alifanke Lins lerte uzas abundan esencan fontaron, inter alie ankaŭ personajn sciigojn el privata korespondado, kiu reiras ĝis la 70aj jaroj.

Formale avertante pri tio, ke „certe estos legantoj, kiuj plendos, ke gravaj detaloj mankas“, en siaj enkondukaj vortoj Lins konscias, ke „plena analizo de la historio de UEA estas tasko farota.“

Fine de la libro (agrabla broŝurita), kiu enhavas riĉan kolekton de interesaj ilustraĵoj, sekvas listoj pri la prezidantoj kaj direktoroj de UEA, redaktoroj de la revuo *Esperanto*, historia kroniko de la Esperanto-movado kaj bibliografio de uzataj fontoj.

Poblet i Feijoo, Francesc. La Universala Kongreso de Esperanto de 1909 en Barcelono. El Congr s Universal d'Esperanto de 1909 a Barcelona. 135 paĝoj. Kataluna Esperanto-Asocio Sabadell 2008. Prezo: 18.30 €

Jen tre leginda studaĵo, ĉar ne tre konata temo, pri la antaŭhistorio kaj historio de la 5a Universala Kongreso en Barcelono en 1909. La tekston verkis, en la kataluna lingvo, la barcelonano Francesc Poblet i Feijoo (*1960), kiu estas historiisto pri socia kaj kultura antropologio. Kiel membro de la Konsilio de la Departemento pri Nuntempa Historio de la barcelona universitato kaj ĉefredaktoro de la revuo *Lletres* li akiris certan renomon kaj prestiĝon. Li publikigis artikolojn pri la historio de la „kataluna esperantismo“ kaj aŭtoris plurajn librojn pri la historio de Katalunio, kaj en 2004 aperigis la volumon pri la komenca esperanto-movado en Katalunio. Kiel Bernat Joan i Mar , sekretario pri lingvopolitiko de la Registaro de Katalunio, skribis en la prologo al la libro, ke la historio de la kataluna Esperanto-movado estas interesega. Samtempe li atentigas, ke Zamenhof ne plene konsciis pri la implikaĵoj de Esperanto en Katalunio, kiam la kataluna nacia movado plene evoluis. Tamen, oni ne subtaksu la sentemon de Zamenhof, ĉar kiel teoriisto de la naciismo li verŝajne bone komprenis la kialojn de la tumultoj en Hispanio, kiujn li e  aludis en la kongresa parolado, sen fariĝi partiano de unu aŭ alia flanko, dankante kaj la hispanan reĝon kaj layudante la barcelonan urbon samtempe. Do, du utopioj renkontiĝis – la esperantista kaj la kataluna, tiel ke la interrilatoj estas videblaj, same la politika kaj socia kunteksto en tiama Katalunio kiel grava faktoro por la ekesto kaj prospero de la kataluna Esperanto-movado. Fakte Katalunio kiel loko de la Universala Kongreso estis diskutata dekomence kaj do ne estis granda sensacio, kiam en Dresdno Barcelono estis elektita kiel loko de la UK en 1909. Sendube Pujul  i Vall s estis la centra figuro de la ideo efektiviĝi la kongreson, kaj dank' al lia personaj rilatoj kun Zamenhof li sukcesis e  venigi la majstron mem. Sed grava incidento subite endanĝerigis kaj dubigis la okazigon de la kongreso en somero

1909 pro la eventoj dum ‚La Tragika Semajno‘: berbera atako instigis la hispanan registaron sendi armeon, kies anoj devenis ĉefe el Katalunio. La soldatoj rifuzis pafi, en pluraj urboj eksplodis ĝenerala striko, ekbrulis religiaj konstruaĵoj, dekmiloj da barcelonanoj estis envolvitaj en la tumultoj. La bilanco de la konflikto estis 100 mortintoj kaj 390 vunditoj inter la civitanoj, aresto de ĉirkaŭ 2000 homoj, ducento da anarkiistoj kaj respublikistoj estis deportitaj. Du tagojn antaŭ la komenco de la kongreso la reformpedagogo Francesc Ferrer i Guàrdia estis arestita, ĉefakuzita pro la organizo de la ribelo, kaj finfine pafmortigita. Malgraŭ tiuj revoluciaj spektakloj, la Universala Kongreso tamen povis okazi, pri kiu Poblet i Feijoo liveras detalan kronikon, inkluzive de la postkongreso en Valencio. Do, ekde tiam Barcelono kaj Katalunio firme apartenas al la Esperanto-movado, formante ĝian integran pilieron. La fifamaj ‚katalunaj vesperoj‘ restas en ĉies memoro, kiu partoprenis Internaciajn Junularajn Kongresojn de TEJO en la 1980aj jaroj. Ĉi tiu libro, en kiu la ‚kataluna vidpunkto‘ nature sentebblas, estas modele farita kaj povas servi kiel trafa ekzemplo por verki similajn studojn pri aliaj universalaj kongresoj. La katalunlingva teksto, kiu aperas en la unua parto de la libro, estas tradukita al Esperanto de Raúl Salinas Monteagudo kaj reviziita de Abel Montagut i Masip. Tiel eblas kompari ambaŭ lingvojn kaj eĉ iom lerni la katalunan. En la mezo estas aldonita 20-paĝa parto kun interesaj bildoj kaj ilustraĵoj, eĉ tipografie bonkvalitaj, kio faras el la broŝuro agrablan legaĵon. En la bibliografio oni trovas kelkajn titolojn, kiuj rilatas al la historio de la Esperanto-movado en Katalunio.

van Dijk, Ziko. La Asocio. Skizoj kaj studoj pri la historio de UEA. 301 paĝoj.

Flandra Esperanto-Ligo Antverpeno 2008. Prezo: 22.80 €

12 legindajn skizojn kaj studojn prezentas al ni la germana esperantisto Ziko van Dijk, loĝanta en Nederlando, kiu ekde 2003 esploris la arkivojn de Biblioteko Hector Hodler (BHH) de UEA en la Centra Oficejo en Roterdamo. Dum tiu tempo li ne nur plenumis sian oficialan taskon, kiu konsistis en la verkado de raporto pri la stato kaj eblaj scenaroj por la estonteco de la kolekto. En sia privata tempo van Dijk (ankaŭ konata kiel Marcus Sikosek) pretigis sian disertacion (*Die Neutrale Sprache, 2006*) kaj faris abundajn notojn, el kiuj estiĝis ĉi tiu libro, kiu konsistas el pli kaj malpli longaj kontribuajtoj, kiuj traktas diversajn epizodojn de la historio de Universala Esperanto-Asocio. La historio de BHH, kiu konsistigis lian raporton, aperas do nun feliĉe ankaŭ en ĉi tiu libro. Detale traktata en tiu raporto estas la svisa, svisa-brita kaj nederlanda periodo de BHH ĝis 2006. Relative multan atenton ricevas statutaj, teknikaj kaj financaj cirkonstancoj, kio faras la legadon iom teda. En aparta ĉapitro estas traktata ankaŭ ‚la kazo Jakob‘, kiu evidente fariĝis unu el la ŝatataj objektoj de van Dijk, kiun eblas utiligi (eble ankaŭ misuzi) por kulpigi konkretan personon pro plej diversaj misoj en UEA. Kiel konkludon pri la stato de BHH, kiu daŭre sub malfacilaj kondiĉoj nun troviĝas en la iama Salono Zamenhof en la domo ĉe strato Nieuwe Binnenweg 176, Rotedamo, van Dijk skribis: ‚Sen scii ĉu la Asocio decidis teni la bibliotekon aŭ ĉu la nuna konstruaĵo daŭre eltenos la paper-amasojn..., la foje esprimita ideo, ke UEA povus fordoni sian bibliotekon al ekstermovada instanco, montriĝis nerealigebla. Konversacioj montris ke, eĉ se tiuj instancoj havus interesigon, ili ne povus transpreni la kolekton de UEA en senchava maniero. Ankaŭ por UEA mem estus neoportune fordoni sian laborinstrumenton, des pli pro tio, ke la Asocio estas ankaŭ eldonanto kaj libroservo.‘ Tamen, kiel opinias la verkanto de ĉi-recenzo, se BHH ne povas profesiece funkcii kiel

ekzemple Sammlung Plansprachen en Vieno, estas dubinde ĉu havas sencon plurentreni la bibliotekon kiel ĝis nun. Ĉi tiu komplete izolita BHH, kies uzado eblas nur surloke en interkonsento kun la estroj de UEA, troviĝas en eĉ pli malbona situacio ol ekzemple CDELI en La Chaux-de-Fonds, kies arkivaĵoj tamen estas almenau parte atingeblaj sine de regiona biblioteka elektronika reto.

Kiel en la kazo de la UEA-rezolucioj, ankaŭ la historiaj statutoj de UEA ne ludas grandan rolon en la kolektiva konscio de la esperantistoj aŭ de la membroj, kiel van Dijk prave lamentas. Komentita eldono ne ekzistas, kaj ankaŭ la ĉirilata ĝenerala historiografio estas iom magra. Pro tio van Dijk decidis kompili komencan superrigardon pri la evoluo de la UEA-statutoj. En la jaroj 1908, 1920 kaj 1934 aperis novaj statutoj. Al la fenomeno, kiu kaŭzis ke en 1936 la plimulto de la alligitaj naciaj organizoj rezignis pri la lojaleco al la ĝeneva UEA, kiu postrestis kun ducento da anoj, kaj kolektive transiris al la nova IEL, en kiu kolektiĝis sesmil membroj, necesus foje doni pli da atento. Laŭ la nuna statuto UEA estas organizo fondita en 1947 kiel kunfandiĝo de du pli fruaj organizoj: de UEA de la 28a de aprilo 1908 kaj de Internacia Esperanto-Ligo (IEL) en 1936. La statuto de 1947 bazigis sur la koncepto de IEL. Kio en 1947 do okazis inter UEA kaj IEL estas kutime konsiderata kiel reunuiĝo, kuniĝo, kunfandiĝo. Laŭ Giorgio Silfer (Literatura Foiro, n-ro 230/2007, p. p. 293) IEL, fondita en 1936, en 1947 simple ŝanĝis nomon: tiam pli ol kunfandiĝo temis pri ensorbo. Estas demando de terminologio. Sub la tiamaj cirkonstancoj, la malnova kaj tre malforta UEA ne havis alian opcion ol ensorbiĝi, aŭ pereji memstare. Poste precipe Lapenna kaj post li Tonkin enmiksiĝis en la statutaj diskutoj. La ‚statuta historio‘ de UEA restas do ankoraŭ skribenda, eble fare de interesata juristo en kunlaboro kun kompetenta historiisto, ĉar la studeto de van Dijk povis resti nur rudimento.

Tre necesa temo ja estas ankaŭ la analizo de la historio de la historiografio de la Esperanto-Movado. Kelkajn objektivajn obstaklojn, kiuj malhelpas seriozan profesinivelan historiografian laboron, van Dijk mencias en la koncerna kontribuo pri tiu temo. Kiel van Dijk montras laŭ multnombraj ekzemploj de personoj, kiuj provis verki aŭ verkis pri la historio de la Esperanto-movado, ĉi tiuj kontribuoj estis ofte subjektivaj. Ekzemple *de Beaufront (1903/4)* ŝovis sian personon en la centron de la atento, *Couturat* kaj *Leau (1907)* iom moketis pri la ‚sanktaj‘ dokumentoj de la esperantistoj, aŭtoroj kiel *Zakrzewski (1911/13)* verkis kun propaganda intenco, la diplomato *Privat (1923/27)* estis tro idealisma aŭ romantika kaj evitis fari kritikon aŭ eĉ riproĉojn. *Drezen (1931)* analizis ĉion tra la okulvitroj de marksisto-komunisto, kiu ne ŝatis la burĝaĵojn en la movado. La lernolibro de *J.R.G. Isbrücker (1932)* estas laŭ van Dijk duba kvalifiko, sed plibonigita fare de *Støp-Bowitz (1948)* en nova eldono. La redaktoroj de la *Enciklopedio de Esperanto (1934)*, kiun van Dijk laŭdegas kiel „grandiozan monumenton por la kapablo de la movado“, sen kritiki ĝiajn gigantajn fuŝojn, distordojn kaj prisilentojn kaj sen malkaŝi ĝian almenaŭ sublimale antisemitisman karakteron, jes, prave, kripligis la fontojn. Negative taksata estas ankaŭ la verkaĵo de *Hans Jakob (1958)*, prilaborita de Mark Fettes, kiu laŭ van Dijk savis la tekston sub la titolo „Servisto d’l ideo. 50 jaroj ĉe UEA 1908-1958“. Ankaŭ la *Historia Skizo* de *Waringhien (1959)* ŝajnas al van Dijk tro subjektiva, kaj la volumoj de *Courtinat (1964-68)*, kiun van Dijk taksas komplete nekompetenta aŭtoro, ĉar li ne kapablis respekti bazajn regulojn de scienca kunlaborado, „estas la plej trista kazo de plagiato en la historio de la historio de Esperanto“. Ankaŭ en la kazo de la recenzado de la libro *Esperanto en perspektivo (1974)* van Dijk ne tro ŝatas kion skribis Lapenna kaj

principe laŭdas kion aŭtoris Lins, kvankam „foje, eble ne ĉiu leganto emas sekvi la interpretojn de Lins“. Ke la *Gvidlibro por supera ekzameno (1979)* de Pechan, kiu aperis en komunisma Hungario, ne povis esti tio kion la movado vere bezonis (aŭ bezonus) kiel objektivan gvidlibron, ne necesas aparte substreki. Oni ne forgesu en kiu epoko oni troviĝis en la 1970aj jaroj. La movado svarmis de pli malpli blindaj komunistoj, kaj oriente kaj okcidente. La verko de la sociologo Forster (1982), *The Esperanto Movement*, estis laŭ van Dijk la „lumturo por postaj esploristoj“ kaj „eble la unua, kiu tiel serioze kaj science aliris la temon kaj respondece uzis siajn fontojn.“ Laŭ van Dijk Auld (1988) en sia *La fenomeno Esperanto* „kreskigas certan negativismon kaj amaran sintenon ĉe la leganto“. Draŝa kritiko trafas fine de la revuado tra la historio de la historio de la Esperanto-movado la libron *Historio de Esperanto* de Korĵenkov (2005), al kiu van Dijk, prave, riproĉas interalie facilaniman traktadon de fontindikoj kaj fremdaj eldiroj. Aliflanke, la kritiko pri piednotoj neniel estas pravigebla: Unue Korĵenkov ne misuzis „piednotojn por aldonaj informetoj kaj komentoj, kiujn li ial ne volis meti en la kutiman tekston.“ Estu la plene suverena decido de aŭtoro, kion meti en la kutima teksto kaj kion en piednotoj – tio ofte estas malfacila decido kaj bezonas la kapablon mezuri. Ĝuste la piednotoj estas ofte la plej interesa parto de la libroj de Korĵenkov. Due, koncerne alian rirpoĉon, en piednoto 16 de la ĉapitro pri la franca periodo, p. 112, Korĵenkov ja utiligis la libron ‚Sed homoj kun homoj‘ de Sikosek (kiu cetere estas lia plej malbona libro). Plej malfrue en ĉi tiu ĉapitro van Dijk malkaŝis kia orgojla ulo li estas, kiuj eble tamen ne ĉiam trafe kapablas taksi la aferojn. Sed ĉe junaj ambiciaj verkistoj, kiuj ĝuas neatenditan sukceson, tiu sento estas tute normala.

Sekvas aro de mallongaj artikoloj, kiujn van Dijk karakterizas pli ĵurnalisme verkitaj: pri Centraj oficejoj de UEA en Ĝenevo, pri esperantistaj respondkuponoj en la 20-30aj jaroj, pri la protestoj de ĉeĥoj rilate al la utiligo de germanaj nomoj en la Jarlibro de UEA kaj la reago de germanoj (1930), pri la plendoj de la Brita Asocio kontraŭ la engaĝiĝo de Edmond Privat en la hindia naciliberiga kunteksto (1932), pri la legendeca afrika ŝipkaravano al Afriko kadre de la 27a UK en Romo en 1935, pri la resendita poŝtkarto, kiu estis adresita al Bastien en okupita Francio, al IEL en Britio (1942), pri la kritiko de Stuttard kontraŭ la laŭdire malbona laboro de la „samseksamanto“ Nicolaisen kiel Kongresa Sekretario (1951) kaj pri la konfliktetoj ĉirkaŭ John Rapely en Heronsgate (1955). Entute ĉio ĝuindaj epizodoj apenaŭ konataj ĝis nun. Longa studo estas dediĉita al la historio „Fighiera en Varsovio“ (1959) kun provo rekonstrui la tiamajn internajn problemojn, kiujn la Konstanta Kongresa Sekretario el Italio frontis, kiam li kunpuŝiĝis kun la politika realeco de tiam Pollando kaj spertis ne nur financajn, organizajn kaj teknikajn obstaklojn, sed konstatis ankaŭ tendencojn de antisemitismo (aŭ almenaŭ kontraŭjudeco), laŭ eldiroj de Dratwer. Ke la libro finiĝas per artikolo pri la fiaskinta „Propono pri amasapogo“ de Lapenna ĉe UN en 1966, eble staras simbolo por la ĝenerala malsukceso de Esperanto, kiu ĝis nun vane atendas sian adopton ĉe Unuiĝintaj Nacioj aŭ en la unuopaj membroŝtatoj.

Kvankam liaj rakontoj kelkfoje restas (neeviteble) iom tro skizaj kaj suprajaj, van Dijk lerte kombinas malfacilajn historiajn momentojn de la Asocio kun la ĝenroj de la skandalhistoriografio kaj distra amuzliteraturo surbaze de diversaj fontoj (kaj pere de ekspluato de diversaj privataj korespondaĵoj, kio estas kelkfoje iom tikla praktiko). Ĉi tiu specifa „ĝenro“, tipa por la aŭtoro, kiu pruvis sian talenton jam pere de la klopodo senlegendigo la historion de la Esperanto-movado, faras liajn librojn allogaj kaj, ĉefe, vekas interesiĝon pri la fora kaj polva historio. El laŭŝajne banalaj incidentoj kaj detaloj

van Dijk kapablas konstrui, surbaze de historiaj faktoj, iom amuzajn rakontojn (kiuj por certaj koncernitoj eble ne estas tiom amuzaj). Bona tipografio, malbonkvalitaj fotoj, ne tro belaspekta kovrilo, sufiĉa bindokvalito (broŝurado).

Korĵenkov, Aleksandr: Homarano. La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L.L. Zamenhof. 320 paĝoj. Sezonoj Kaliningrad 2009. Prezo: 27.00 €

La ĉefaj karakterizoj de tiu nova biografio estas: didaktike taŭga prezento de la homaranismaj materialoj rekompile sur la bazo de ekzistantaj verkoj, kritika sinteno rilate al legendecaj kaj hagiografiaj elementoj prezentitaj en ĝisnunaj Zamenhof-biografioj, konsidero de kelkaj novaj esplorrezultoj fare de Korĵenkov, Romaniuk kaj Ignatoviĉ, grandparte distanciĝo de la ĝisnuna tradicia zamenhofbiografia skemo, konsidero de multaj faktoj pri cionismo kaj judaj aferoj, kontrolado de fontoj kaj informoj kaj atentigo pri eraroj kaj kontraŭdiro – konklude do: la ĉefa merito de la verko estas ioma ordigo de la temaro kaj reĝustigo, repoziciigo de la kompleksa materialo en simpligita formo, ĉefe por komencantoj kaj novuloj. Samtempe akceptiĝis novaj ĝis nun malpli konataj anekdotoj, aŭ supozoj, ekzemple ke ĉe la zamenhofa pseŭdonimo ‚Unuel‘ temas verŝajne pri la imito de la nomo Aĥad ha’Am (p. 124), aŭ dubindaj ke kiam Zamenhof serĉis eldoniston por sia ‚Unua Libro‘, li eble preterpasis ankaŭ ĉe iu vilna presisto (laŭ Ŝilas, p. 70), aŭ amuzaj ke inter Boirac kaj Fruictier (ne Fructier, p. 178) estis planita duelo kaj ke en Bulonjo oni verŝis likvoron Esperantine (p. 184), k.s., do multaj detaloj, kiuj en la historio de Esperanto kaj biografio de ĝia kreinto ĝis nun ne estis tiom atentataj. Sed ĉu ili gravas por la vivo kaj verko de Zamenhof, estas alia demando, konsideru ilin kiel akcesoraĵojn efemerajn. Malgraŭ tiuj atingoj, la biografio de Korĵenkov esence estas la proza ripeto, aŭ transformo de sia eble eĉ pli meritplena libro ‚Mi estas homo‘ (2008), precipe de ties notaro originale kompilita, kiu en sia plimulto reutiliĝas en la biografio ‚Homarano‘. La rigora kaliningradano, inĝeniero laŭ profesia edukiĝo, due verkisto, tradukisto, redaktoro kaj historiisto, aplikas striktan terminologian uzadon ĝis pedanteco: Ruslanda judo, Ruslanda imperiestro (anstataŭ rusa caro), Granda Litvo, ktp. Ŝajnas, ke rilate la terminologion la aŭtoro grandparte sekvas la rekomendojn de Waringhien, Maimon, Holzhaus, laŭ kies historiografia tradicio Korĵenkov orientiĝas anstataŭ laŭ la duonseriozaj, ĉefe propagandaj verkoj de Boulton, Ziółkowska, Kraŝko kaj Centassi/Masson. La ĉefa tema koncentriĝo de la biografio de Korĵenkov rilatas al la hilelismo/homaranismo ĉe Zamenhof kaj la lingvaj reformdiskutoj, dum aliaj temoj estas eble iom neglektataj (kiel la kongresaj paroladoj, kvankam nur la unuaj du-tri estas esencaj, kion Korĵenkov ja emfazas). La fondo de UEA en 1908 estas nur rande menciita (efektive en tiu tempo tiu fondo ŝajnis ne tro signifa evento kaj nura kaprico de iu svisa junulo, kiu plendis, ke oni ne sufiĉe serioze konsideras lin kaj liajn intencojn), la reago al ĝi far Zamenhof ellasita, aliflanke la kritika sinteno de Hodler al la tiamaj duonsanktaj parizaj Esperanto-instancoj rememorigita. En aparta ĉapitro estas detale pridiskutita la verkaĵo ‚Esenco kaj Estonteco‘ de Zamenhof kun konsidero de la komento de kelkaj esperantistoj, kiuj okupiĝis pri tiu eseo. Pro la troa fokusiĝo al homaranismo kaj lingvoreformdiskutoj, kaj eble pro tempomanko (la libro estis verkita en nur kelkaj monatoj sub enorma tempopremo) kaj ĉar la libro fariĝus tro ampleksa, la politika-socia-kultura fono de la situacio en Ruslando kaj Pollando estas apenaŭ konsiderata, kvankam iuj centraj (aŭ kadraj) eventoj de la rusa historio kaj politiko dum la vivotempo de Zamenhof ja estas

menciitaj. Bone, la tasko ne estis verki libron pri la historio de Ruslando, kaj la interesataj legantoj de la biografio de Korĵenkov mem konsultu laŭplaĉe la nacilingvan fakliteraturon pri ruslanda historio ktp. Tamen ĉe tiuj legantoj, kiuj konsideras la politikan fonon de la zamenhofa tempo tre grava, aperas vole nevole la impresoj, ke la aŭtoro, kiu evidente ne tro interesiĝas pri politiko, timas tuŝi la ruslandan politikon kiel la diablo timas la konsekritan akvon. La nomo de la caro (aŭ imperiestro) Aleksandro III. aperas nur en piednoto lige kun la alkohola problemo, personecoj kiel Pobedonoscev eĉ tute ne estas menciitaj, kvankam ili kiel malŝatantoj de judoj kaj aliaj nacimalplimulto grandparte determinis la internan politikon de la imperio en la vivotempo de Zamenhof, precipe dum la aperotempo de Esperanto (1887) kaj do rekte-nerekte influis la konkludojn de Zamenhof pri kreo de la neŭtrala lingvo kaj religio reage al la intergenta situacio en Bjalistoko kaj en la Ruslanda Imperio (sed tiuj ideoj aperis ĉe li jam en la vivotempo de Aleksandro II., kiu en la familio de Zamenhof devis esti taksita pozitive). Objektive kaj detale klarigi tiun tutan politikan-kulturan-socian fonon kaj la fifaman carisman politikon pri nacimalplimulto devus esti foje la tasko de Zamenhof-biografioj. La vorto ‚antisemitismo‘ aperas en la libro nur dufoje, unuafoje sur paĝo 256, kvankam tiu fenomeno estis unu el la centraj problemoj de la vivotempo de Zamenhof (oni pensu ne nur pri la Dreyfus-afero en Francio, sed ankaŭ pri la kreskanta antisemitismo en praktike ĉiuj landoj de Eŭropo). Antisemitismen la aŭtoro ŝajnas ŝovi unuavice al poloj, referencante al artikolo de Niemojewski en *Pola Esperantisto* de 1914 (p. 258). La gravecon de la pogromoj en Ruslando Korĵenkov milde dirite bagateligas. La tuta carismo estas tuŝita de Korĵenkov per veluraj gantoj, kaj li sentas la bezonon speciale atentigi pri tio, ke la kelkaj plej lastaj caroj de Ruslando, estante grandparte de germana deveno, ĉiukaze havis ĉiam malpli kaj malpli da rusa sango.

Iom kurioza citaĵo, kiun povas utiligi nur eksa sovetiano, estas tiu el Lev Ĵirkov, „Kial venkis Esperanto“, Ekrelo 1931, laŭ kiu Esperanton savis el la krizo la inerta amaso de averaĝaj esperantistoj - etburĝoj, kolektantoj de poŝtmarkoj kaj poŝtkartoj... (p. 226). Malfacile diri, ĉu tiu pritakso kongruas kun la persona opinio de Korĵenkov pri la Esperanto-movado; ĉu entute la aserto de Ĵirkov estas utiligebla, sen atentigi, ke ĝuste la termino „etburĝo“ servis poste kiel ideologia pravigo en la stalinisma purigado, en kiu kiel konate ankaŭ ne malmultaj esperantistoj fariĝis viktimoj. Do, la pri historiaj aferoj tro sentema leganto de la libro de Korĵenkov eble interpretas diversajn detalojn kun vana skeptiko, sed pluraj demandoj pri intencoj kaj kaŝitaj mesaĝoj, kiujn la aŭtoro eventuale havis apud la prezento de Zamenhof, restas tamen malfermitaj.

En pluraj kazoj mankas fontindikoj, ekzemple pri pogromoj en Bjalistoko, pri elpaŝo en la franca parlamento en 1906 (p. 213), kaj persona indekso bedaŭrinde ne ekzistas, same kiel fotoj ne aldoniĝis. La bibliografio estas standarda. Ŝajnas, ke Korĵenkov ĉerpis siajn ekster-Esperantajn informojn ĉefe el la ruslanda historiografio (ekzemple pri cionismo). Tajperaroj estas tre malmultaj kaj kvazaŭ ignorindaj. La tipografio estas meznivela kaj la bindaĵo iom kruda, la vendoprezento de 27 eŭroj ŝajnas sufiĉe alta por malgrandformata, simpla kaj ne tro bela libreto kun 320 paĝoj, despli ke la preso okazis en orienta Eŭropo, kie produktokostoj estas pli malaltaj ol en okcidenta Eŭropo.

Certe, ankaŭ Korĵenkov devis kapitulaci antaŭ la komplekseco de la temo „Zamenhof“, kiun li ja sendube bone konas, tiel ke ankaŭ lia laboro kiel ajna alia provo verki tian biografion ne povas esti kompleta kaj tute kontentiga. Malgraŭ tio la verko estas bona kontribuo, kies ĉefa merito estas montri en kiu direkto la Zamenhof-

biografiado povus, au devus iri. La titoloj de la unuopaj ĉapitroj memorigas la (bonajn) kutimojn de la sciencpopulara literaturo, kun la malavantaĝo ke estas iom malfacile trovi la diversajn temojn laŭĉapitre (en tiu rilato Korĵenkov imitis pli la modelon de Wendy Heller /Lidia/ anstataŭ teni sin al la normoj de la scienca monografiado).

Resume kaj konklude: Unuaj reagoj al tiuj libroj montras, ke ili trovis parte entuziasman bonvenigon, krom ĉe tiuj kritikantoj, kiuj persone ne ŝatas la aŭtorojn. Due: Egale ĉu temas pri ‚kortega‘, naciismema, skandala aŭ tro unuflankeca historiografio, la metodaj intencoj de la kvar supre prezentitaj aŭtoroj estas evidentaj. Tio ne estas riproĉo. Restas do ĝenerale la timo, ke la publiko ne nur senkritike konsideros tiujn librojn kiel ‚la veron‘, el kiuj oni citos kaj al kiuj oni blinde referencos, sed juĝos ilin laŭ la populareco de iliaj aŭtoroj. Alia problemo, eĉ pli grava: Ĉar tiuj verkoj estas skribitaj en Esperanto kaj ĉar la Esperanto-movado ne estas agnoskita de la ‚ekstera mondo‘ kiel reala mikrosocio kun kulturo kaj scienca aparato, ekzistas la risko, ke tiuj verkoj restos konataj nur al (limigita rondo de) esperantistoj kaj ne sufiĉe trovos la adekvatan honoron de la nacilingva fakula mondo, se tradukoj ne estos faritaj. Tiajn librojn necesus foje recenzi ankaŭ el neesperantista/nacilingva vidpunkto fare de vere kompetentaj fakuloj.